

Aŭstraliaj Esperantistoj



Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 19/03/2020 Kvarcentsepdeka eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **711,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **276,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **233,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **202,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro.112



Ni vidis, ke la Faktitiva Voĉo formatas per la sufikso "igi". Sed la praktikado de P.A.G. kaj de Zamenhof povas krei malklarecon, nome kiam uzatas verboj ĉe kiuj la aganto kaj la agato povas aŭ esti la aganto. Ekzemple en "La patrino lavigas la knabon": ĉu ŝi igas la knabon lavi ion (kiel en "Ŝi lavigas la knabon la aŭton = Ŝi igas la knabon lavi la aŭton") aŭ ĉu ŝi igas iun lavi la knabon (kiel en "Ŝi lavigas la patron la knabon = "Ŝi igas la patron lavi la knabon"?). Tiun neklarecon mi Fundament'ece proponas eviti uzante por la pasiva voĉo ("suferigi agon") plenan radikon pasivan: "Ŝi lavatigas la knabon" kontraŭ "Ŝi lavigas la knabon". Tiamaniere la regulo devas teksti simple "'-igi' = fari ke iu aŭ io faru agon, aktivan aŭ pasivan". En tiu kazo "-igi" estas la faktitiva sufikso por "fari ke iu faru agon", do "lavigi knabon" (kie la knabo lavos) aŭ "lavitigi knabon" (kie iu alia lavos la knabon). **Marcel Leereveld.**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Estas viruso en mia ĝardeno.

ĈU VERE ?

Jes, vere. kaj ĝi atakis min antaŭ unu jaro, kiam mi vundiĝis per arbbranĉo falanta sur mian kapon kaj malfermante vundeteton tra la skalpo. Baldaŭ viruso kaptis la okazon kaj infektis min per viruso nomata *Herpes zoster* (zostro aŭ zonerupcio), angle “shingles”. Mi plu havas tiun virusan malsanon; ĝi verŝajne restos ĉe mi ĝis mi mortos post tridek jaroj.

La alia viruso, pli mortigema, la nova koronaviruso, tre verŝajne ankoraŭ ne venis en mian ĝardenon, kaj tial mi tre malofte forlasas mian ĝardenon kaj mian domon. Tio ne signifas ke tiu viruso ne povas atingi min, ĉar kun mi loĝas miaj nepo kaj nepino kaj bonepo, kiuj tri ofte eliras al Melburno kaj antaŭurboj, por laboro kaj butikumado kaj vizitado. Ilin verŝajne ne mortigos la viruso, sed min ĝi certe, pro mia malforteco.

MI AKUZAS

la viktorian registaron ke ĝi helpas la koronaviruson, ne malpermesanta la eniron en Viktorion sen testi aŭ kvarantini ĉiujn homojn kiuj deziras eniri. Se ĝi farintus tion, ĝi nun ne bezonus serĉi la sepdek pacientojn de la kuracisto kiu eniris Viktorion, ne sciante, kun la nova viruso. Malpermesi sentestan eniron en nian ŝtaton ŝparintus multege da laboro.

ĈU DANUJO PRAVAS ?

Nia registaro diras, ke imiti la reagojn de Danlando estus tro drasta. Mi malsamopinias, ĉar la nova situacio pro la drastaj limigoj en tiu lando estas sama al la socia situacio en kiu mi vivis kiel knabo en Nederlando antaŭ la dua mondmilito. En tiu periodo ekzistis multe da senlaboreco, kaj la senlaboruloj kaj multaj laboristoj devis vivi kiel oni nun vivas en Danujo sub la nunaj drastaj limigoj. En tiu antaŭmilita periodo granda parto de la popolo neniam povis iri al koncertoj aŭ aliaj amuzoj. Oni ne havis la monon por tio, nek por vojaĝi vagonare aŭ eĉ trame, nek por ferii ekster sia loĝejo. Do oni vivis sen la plezuraĵoj kiujn nun oni limigis en Danujo. Ankaŭ vidi filmojn kaj ekspoziciojn estis tro multekosta por ni. En tiu tempo, pro monmanko, ni restis hejme kaj nur povis iomete promeni ĉirkaŭ la domo aŭ, se ni havis kadukeman biciklaĉon, viziti samfamilianojn. Kiel infanoj ni iris al la lernejo, kaj post la lernejo iris hejmen por fari lernejlaboron aŭ ludi aŭ aŭskulti la radion. Televido ankoraŭ ne ekzistis. Nur kelkfoje ni ludis en la strato kun aliaj infanoj. Sportojn ni ne povis fari, nek membriĝi al kluboj, ĉar tro karaj. Ni tamen ĝuis la vivon, hejme. Do kial ne enkonduki tian vivon nun, por kontraŭbatali la viruson? Almenaŭ ni povas manĝi kaj trinki akvon kaj dormi, kion oni ne povas se atakita de la viruso. Kaj la riĉaj aŭstralianoj? Ili foje gustumu la vivon de la malriĉuloj, precipe en nun malriĉaj landoj. Se en Aŭstralio ni havos virusan pandemion, kulpas ke la registaro ankoraŭ ne “danujumis”. Se iam ni devas fari militon estas nun, kontraŭ la nova viruso. Kaj sen egoisme plenigi sian domon per manĝaĵoj kaj fekpapero, kie la indonezianoj pli higiene uzas akvon por lavi sian postaĵon.

Marcel Leereveld.

POR LINGVISTOJ.

Antaŭ du semajnoj mi menciis, ke mi asertas ke eĉ ĉe “verboj kombinitaj” ĉiu el la elementoj alportis sian signifon, kaj ke tial ĉiu el la elementoj estis antaŭ la kombiniĝo aparta

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

speco de participo. Nur ĉar “*sent*” en “(La letero) *was sent* (hieraŭ)” estis antaŭ la kombinado PASIVA PARTICIPO (sentempa), la kombinaĵo signifas la pasivvoĉan preteriton, kaj nur ĉar “*sent*” en “(Mi) *have sent* (la leteron)” estis antaŭ la kombinado PASINTTEMPA PARTICIPO, la kombinaĵo signifas la aktivvoĉan perfektion. Antaŭ ol la du “kombinitaj verboj” en la etnaj lingvoj ricevis siajn participojn, kvankam samformajn, tiuj havis malsamajn funkciojn, kio decidis pri la verbkombinaĵo. Unu “verbo kombinita”

kapablis formati per la participo por la alia "verbkombinaĵo. Ni ne forgesu la diferencon inter “*The letter has been a sent letter*” (= tempindika) kaj “*I caused the letter to be sent*” (= voĉindika). Rezulte: “*sent*” enkondukas sian temposignifon AŬ sian pasivecosignifon en la du “kombinitajn verbojn”. Sed ĉar tiaj verbkombinaĵoj ne ekzistas en Esperanto, la eŭropaj Esperantistoj malĝuste aldonas ekstran pasintecan tempon al siaj Esperantaj participoj.

Krom ĉi supra tialo, kial mi nomas “*sent*” (kaj “*have sent*”) en “*have sent*” PASINTTEMPA AKTIVVOĈA PARTICIPO (kaj “kombinita perfekte”), kaj kial mi nomas “*sent*” (kaj “*was sent*”) en “*was sent*” PASIVVOĈA SENTEMPA PARTICIPO (kaj “kombinita pasiva voĉo”), nome ke la uzata participo por la du funkcioj havu du malsamajn nomojn por la samforma participo, krom tio ekzistas alia tialo por nomi la anglan *-ed*-participon per du malsamaj nomoj laŭ siaj du malsamaj funkcioj. Tiu kroma tialo estas, ke oni povas kun Ĉomski ŝanĝi la unuan elementon de la “kombinita verbo” al aliaj vortoj, ekz. el “*have sent*” al “*has sent*” kaj “*had sent*”, kaj el “*was sent*” al “*is (being) sent*” kaj “*will be sent*”. Tio ne eblus, se la elementoj ne plu havus siajn proprajn signifojn. Konsekvence oni rajtas nomi la participon en la kombinita verbfrazo aŭ PASINTTEMPA PARTICIPO aŭ PASIVVOĈA PARTICIPO.

Tria tialo estas, ke la signifo de la eŭropa “kombinita verbo” jam konsistas el pluraj signiferoj, kiel tempo, voĉo kaj la signifero de la ago.

Se la eŭropaj Esperantistoj scias, ke la participo en “*was sent*” indikas nur la pasivecon kaj ne la tempon (kiun indikas “*was*” kaj “*is*” kaj “*will be*”), ili ne uzas en Esperanto malĝuste du kunajn preteritojn en siaj esprimoj kiaj “La letero estis sendita (devas esti “*sendata*”) hieraŭmatene”.

Marcel Leereveld.



DUOLINGO vidu AE 469

respondo al Vera Payne

Por respondi la demandon de Vera, mi diru unue ke la vorto “*mojosa*” ne estas tiom nova.

Helpis la disvastigo de tiu vorto la radioelsendo Muzaiko en kiu oni reklamas ke ĝi estas tutmojosa elsendo. Mi kontribuis al tiu programo je ĝia ekapero antaŭ 10 aŭ 15 jaroj per sendado de miaj intervjuoj. Kreis la vorton junuloj kaj laŭ mia scio ĝi signifas moderna, junstila.

Mi konsentas ke programoj kiel duolingo ne estas tre flekseblaj kaj la lernanto devas ofte demandi sin kial iu formo akcepteblas kaj la alia ne. Ĉu komputila programo ne permesas la flekseblecon de Esperanto aŭ ĉu estas limigo de la konceptadanto de la programo mem?

Franciska Toubale



Karaj,

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Mi vidis, ke Richard Delamore surhavis pasintan sabaton T-ĉemizon kun la vortoj TEJO mojosas. Jen iom malnova filmeto por varbi pliajn TEJO-membrojn. <https://www.youtube.com/watch?v=ZATyCXyFRIU>
Amike, **Nicole Else**



Brizbana Jarkunveno



Pasintan sabaton la Brizbana Esperanto Societo havis ĝian jarkunvenon kun nova membro, Thomas (kun la foto de Zamenhof.). Do, ni havis gaston kiu partoprenis nian klason kaj kafoklaĉon.



Post voĉdonado la komitato estis senŝanĝa.:

Foto de Linda Danzer kaj Caroline Turner, kiuj ĝuas kafon poste

Peter Danzer



La ekonomia sistemo fuŝos?

Mi legis ke la ekonomia sistemo nun bezonas ke homoj aĉeti ne bezonatajn aĵojn por eviti la malkreskadon de nia landa riĉeco. Ĉu ŝparaĵo fariĝas la nova problemo? Ĉu ŝparuloj fariĝas niaj malamikoj?

Do punu ilin per la ŝtelado de ilia mono per impostoj kaj malaltaj interezoj

La konvid 19 viruso nun respondecas pri la perdo de duonmilionaj laborpostenoj en Aŭstralio. Tio estas granda problemo ĉar oni ne povas aĉeti ne bezonatajn aĵojn kaj la sistemo povus panei.

Ĉu la senlaboristoj devus ŝteli por akiri la vivnecesaĵojn?

Eble nun estas la okazo ŝanĝi al universala pensio subtenante minimuman vivstilon por ĉiu aŭstraliano. (aŭ homo)

Amike **Roger Springer**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Rainer lastmomente atingis Germanion

Mi ĝus atingis Germanion pere de unu de la lastaj aviadiloj de Kataro.

Post mia trimonata restado en via bela Aŭstralio, mi ĝus havis ses-tagan interhalton en Doha, la ĉefurbo de Kataro.

Estis impona por mi sperti la vivon en la plej riĉa lando de la mondo. Speciale ĉar dum tiuj ses tagoj mi povis observi la progreson de la limigoj de la socia vivo pro KOVIM-19 (angle COVID-19).

Dum la unuaj tagoj de mia vizito mi vizitis belajn bazarojn kaj viglajn drinkejojn kun granda grupo, tamen la ejoj malpleniĝis ĝis restoracioj iĝis malpermesitaj.

Feliĉe mi povis viziti la faman muzeon de Islama Arto dum ties lasta malfermita tago.

La vendejoj en la grandaj vendejaroj ankoraŭ estis malfermitaj, sed ĉeestis dekfoje pli da vendistoj ol klientoj. Ankaŭ je la plaĝoj mi estis la sola persono.

Unu tagon antaŭ mia forflugo, oni haltigis la publikajn transportilojn kaj malpermesis la ŝtatajn taksiojn. Feliĉe Uber-ŝoforo kiun mi uzis unu tagon pli frue povis ŝofori min kaj mian valizon al la flughaveno. – Parolante pri la flughaveno: La emiro (ŝtatestro de Kataro) ĝus anoncis, ke la flughaveno fermos la sekvontan tagon tagmeze por minimume 14 tagoj.

Mi nun ree estas en Germanio kaj mi/ni nun havos la defion gardi distancon kaj samtempe sekure mastrumi la vivon (ideale havante iom da vivplezuro). Kreemeco nun estas bezonata. Mi almenaŭ estas preta partopreni en tiu eksperimento de spaca distancigo "Social Distance".

Kun multaj salutoj el la duondorma Germanio

Rainer Kurz



-Novaĵoj: Konsiloj por la provirusaj paŭzoj

Estimataj membroj kaj kolegoj,

Sciante ke en plurdekoj da landoj estas krizsituaĵo pro la kronviruso kaj eble estos ankoraŭ en pliaj aliaj landoj, kies konsekvenco estas, ke pluraj Esperanto-aranĝoj estas kaj estos nuligitaj, ni devas trovi manierojn ne lasi perdiĝi niajn kursanojn.

Jen konsiloj por vi laborigi ilin eĉ distance.

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=816>



3ZZZ

En la elsendo de la 16a de marto 2020 aŭdeblas anonco ke la universala Kongreso en Montrealo ja okazos kiel planite kaj recenzoj pri diversaj artaĵoj

Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE